

# Renkontiĝoj

Nova jaro komenciĝas, do nun estas bona momento por havi superrigardon de renkontiĝoj dum la sekva jaro. Kaj ĉar via tempo estas valora, ni resumis ĉiun renkontiĝon en unu frazo.

**IJF:** Venu nepre, se vi pretas naĝi en frosta akvo, elreviĝinte el la espero de varma vetero en mediteraneaj regionoj.

*Internacia Junulara Festivalo. Ostuni, Italujo. 27/03-02/04. [iej.esperanto.it/ijf/2013/?lang=eo](http://iej.esperanto.it/ijf/2013/?lang=eo)*

**RF:** Se vi ŝatas dormi malmulte, loĝi mallukse, manĝi kiel kapro, kaj labori kiel azeno, vi eĉ havos etan ŝancon vidi de malproksime koncerton de apenaŭ konata rokstelulo!

*Roskilde Festivalo. Roskilde, Danujo. 29/06-08/07. [roskilde.festoklubo.dk](http://roskilde.festoklubo.dk)*

**SES:** Diru al viaj gepatroj, ke vi iras por plibonigi vian Esperanton, kaj ĝuu la trinkejon kaj tatran teon.

*Somera Esperanto-Studado. Martin, Slovakujo. 12/07-20/07. [lernu.net/pri\\_lernu/renkontighoj/](http://lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/)*

**UK:** La perfekta renkontiĝo por junuloj. Amuza programo, viglaj koncertoj kaj facile atingebla.

*Universala Kongreso de Esperanto. Reykjavik, Islando. 20/07-27/07. [uea.org/kongresoj/uk\\_2013](http://uea.org/kongresoj/uk_2013)*

**FESTO:** Se vi ŝatas pagi multon por fari nenion dum la tago, kaj vidi dum la vespero la samajn artistojn kiel ĉiam. Pli bone ĝi nomiĝus SIESTO.

*FESTO. Kelmis, Belgujo. 10/08-18-08. [festo.jefo.fr](http://festo.jefo.fr)*

**IJK:** Ĝuu la someron inter la komitatkunsidoj, solenaĵoj kaj grupfotoj.

*Internacia Junulara Kongreso. Afikim, Israelo. 19/08-26/08. [tejo.org/ijk](http://tejo.org/ijk)*

**ArKonEs:** La ĉefa konfronto estas kun la maljuneco de la programo kaj de la partoprenantoj.

*Artaj Konfrontoj en Esperanto. Poznań, Polujo. 20/09-22/09. [arkones.org/eo](http://arkones.org/eo)*

**KKPS:** Estas sendube multaj kialoj por vojaĝi mil kilometrojn por renkontiĝo de du tagoj en mallukso kaj pluva vetero. Tamen sufiĉas scii, kiu herbaĵo estas laŭleĝa en Nederlando.

*Klaĉkunveno PostSomera. Loko kaj dato aperos en sekva Pos-Amiko.*



# Pos-Amiko

Vintro 2012, Numero 3

## INDEKSO:

- TEJO akcidente mendas 500 kondomojn.....1
- Dum JES denove Esperantistoj laboregos por ne bezoni Esperanton.....1
- Ivo anoncas biciklan karavanon al Brazilo.....1
- Poso malkovras: vegetaranismo estis 'akcidento'.....2
- PosAmiko malkovras la sekretan identon de Eterne Rima!.....2
- Eksperimenta koncerto ricevas miksitaĵajn reagojn..3
- El la tombo de Zombenhof.....3
- Horoskopoj.....3
- EVENTOJ.....4

## TEJO akcidente mendas 500 kondomojn.

Dum la pasinta estrarkunsido de TEJO, en Roterdamo, la estraranoj vespere subite rimarkis neceson de kondomoj 'pro sciencaj kialoj', sed ili mankis. Ĉiam solvemaj, la idealismaj gvidantoj de la movado iris interreten por tuj mendi la necesaĵojn. Bedaŭre pro tajperaro la asocio mendis 500 anstataŭ 5 ekzemplerojn, pli ol ili mem bezonis. La informada sekcio de TEJO tiam decidis uzi la kondomojn en nova membrovarbkampanjo, ĉar la unua ideo (uzi ilin por ornamo la oficejon de Osmo) ne ricevis plimulton en voĉdono.

## Dum JES denove Esperantistoj laboregos por ne bezoni Esperanton.

Esperanto, la nura dua lingvo, kiun la homaro bezonas lerni, nuntempe ofte estas portalo al lernado de aliaj lingvoj.

Dum la JES en Naŭmburgo okazos kursoj de ses malsamaj lingvoj (ne kalkulante Esperanton), kaj unu pri efike lerni lingvojn. Tiel la Esperantistoj faras ĉion eblan por ne bezoni sian komunan lingvon. Se vi ankaŭ malŝatas paroli Esperanton, tiam nepre venu al la aligatorejo dimanĉon je la deka matene.

## Ivo anoncas biciklan karavanon al Brazilo

“Ni komencos tuj post la IJK en Israelo kaj planas alveni du tagojn antaŭ la IJK en Brazilo.”

## Poso malkovras: vegetarismo estis 'akcidento'.

La vegetarismo kiel idealismo (kaj ne kiel sekvaĵo de malriĉeco) estas tre juna en homa historio: la unua internacia vegetarana asocio estis fondita antaŭ iom pli ol jarcento, en 1908. Kaj ĝi estis fondita de esperantistoj! Kiel tio okazis?

En tiu jaro la kvara Universala Kongreso okazis en Dresdeno. Ĝia neatendita sukceso (pli ol 1500 partoprenantoj ĉeestis) kreis kelkajn loĝistikajn problemojn por la organizado. Dum la inaŭgura bankedo la ĉeestantoj formangis tiom da viando, ke ne restis sufiĉe por la sekva tago. La elpensaj organizantoj rapide trovis solvon: ili klarigis, ke tio estas idealisma elekto, starigis la Internacian Unuiĝon de Esperantistaj Vegetaranoj, kaj tiel savis la tagon. Ili certe ne antaŭvidis, ke la ideo pluvivos siajn kreintojn, kaj ke tio nun kreas novajn loĝistikajn problemojn por organizantoj, kiuj ĉiam devas oferti du tipojn de manĝo dum ĉiu kongreso.

## PosAmiko malkovras la sekretan identon de Eterne Rima!

Dum la pasintaj jaroj multaj homoj ekkonis la hiphopan kantiston Eterne Rima, kiu jam eldonis du albumojn ĉe Vinilkosmo kaj planas koncerti dum JES en Naŭmburgo. Sed kiom bone la homoj vere konas lin? Pro lia loĝloko en Japanujo malmultaj homoj vidis lin vid-al-vide, kaj tiuj, kiuj renkontis lin, ĉiuj estas organizantoj de JES. Kaj krome li tute ne aspektas kiel japano. Ĉu temas pri iu trompo?

Jes! 'Eterne Rima' komencis aktivi precize tiam, kiam Espo-Despo ĉesis eldoni novan materialon. Tio ne estas hazardo. Inversigu la literojn de 'Eterne Rima' kaj vi ricevos... 'Amir Enrete!' 'Eterne Rima' estas sekreta idento de Amir Hadžiahmetović, kiun li kreis por eniri la hiphopkulturon sen subfosi sian reputacion kiel rokstelo. Amir rifuzis komenti, sed fidinda fonto R. el Kopenhago konfirmas la supozon: "Mi ĉeestis kelkajn koncertojn de Espo-Despo, kaj neniam Eterne Rima estis inter la publiko! Certe ne hazarde."

## ANONCO

Eksperimento pri ligo inter ŝampano kaj ebrieco bezonas volontulojn. Respondu al d-ro B. Telo antaŭ la 31-a de decembro.

## Eksperimenta koncerto ricevas miksitajn reagojn.

Stultega, enuiga koncerto de iu Nederlanda neesperantisto dum la Klaĉ-Kunveno Post Somera - KKPS 2012. Stranga pianoludado kun teda ripetado de la samaj sonoj - kaj ĉiuj devas silenti, anstataŭ babili kaj ĝui la renkontiĝon. Kiu entute komponis tiun eksperimentan verkaĉon kun la titolo "Agordo de piano"? – Gunnar Fischer

Finfine Alekĉjo silentas. – Roĉjo

## El la tombo de Zombenhof.

Saluton karaj legantoj. Jen mia nova kontribuo en la Pos-Amiko. Mi dum la pasinta monato ricevis kelkajn ofertojn de Esperanto, Monato kaj la Ondo, sed kiam la fama Pos-Amiko min kontaktis kun peto skribi por ili, mi jam ne bezonis dubi.

Tiun ĉi fojon mi ŝatus plendi pri la Zamenhofa Tago, kiu okazis antaŭ ne longa tempo. Mi vere scivolas, kiel homoj sukcesas kompreni “Ne nomi min majstro, mi estas nur simpla movadano” kiel instigon por nomi tagon laŭ mi, krei monumentojn kaj verki (terure aktoritajn) teatraĵojn pri mia vivo. Mi hontas. Kaj kreu min, turniĝi en ligna ĉerko estas tre malkomforte.

Unuflanke la du frenezuloj, kiuj interrompis mian eternan ripozon estas plia ekzemplo de tiu obsedo pri mi. Aliflanke mi ja ĝojas pro la unika ŝanco por korekti tiajn movadanojn, kiuj pensas, ke ili reprezentas mian opinion. Kaj krome la cerboj de tiuj du estis bongustaj.

Do jen mia konsilo por tiuj, kiuj volas fari tion, “kion Zamenhof ŝatus”: amikiĝu, ebriiĝu, kaj ĝuu interpopolan amon kaj ĝiajn konsekvencojn. Je via sano.

*-Lazaro Zombenhof*

## La horoskopo

**Ŝafo:** Vi ekhavas belan domon. Bedaŭre ĝi estos farita el neĝo.

**Taŭro:** Vi iĝos membro de la organiza teamo de KKPS.

**Ĝemeloj:** Januaro estas bona monato por danci, sed eĉ pli por bigoso.

**Kankro:** Vi kreos novan koktelon aŭ perdos viajn gantojn.

**Leono:** Atentu pri maldecaj italoj en malbone lumitaj trinkejoj!

**Virgulino:** Post la rapidaj rendevuoj vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi perdos viajn okulvitrojn kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Por legi vian horoskopon, abonu la Pos-Amikon premium™.

**Aleks Kadar:** Vi provos senefikan harkreskigan kremon.

**Sagitario:** Vi malkovros, ke pli molas kuŝi sur planto ol sur planko.

**Kaprikorno:** La de vi organizita aligatorejo fuŝiĝos pro apero de vivaj aligatoroj.

**Akvisto:** TEJO donos kondomojn al ĉiuj krom al vi. Ne prenu tion persone.

**Fiŝoj:** Vi forvetos viajn posedojn en karaokeado.

